


# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1986 ★ Kr 8,50

## ***La Parlamenta domo loko por la jubilea kongreso***



**Inaŭguro  
Ingemund  
Bengtsson**



**Festparolo  
Humphrey  
Tonkin**

★ ***Aliĝu jam nun al la kongreso*** ★

## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.

**Medlemsavgift:**  
Direktansluten medlem 75 kr  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
Kvinpinto. Om du inte får den, med-  
dela födelseår till Esperanto Centro.

## Esperantoförlaget

Postadress:  
Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:  
Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:  
onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoför-  
bundet

Adress: EsperantoCentro  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm tel  
08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist  
Västermov. 19, 732 00 Arboga  
tel 0589-155 31

Utformning: Bertil Danielsson,  
Prästgårdsv 8, 672 00 Årjäng  
tel 0573-105 69

Fotosats och tryck:  
EsperantoCentro, Stockholm 1986



## SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist (La Es-  
pero massmedia)  
Västermov. 19, 732 00 Arboga,  
tel 0589-155 31.

Sekreterare: Anita Lindblom  
(kansliet, medlemsfrågor)  
Mariehamnsgratan 18  
163 27 Spånga  
Tel 08-751 73 79

Kassör: Börje Andersson (massmedia)  
Ingeg. 4 A, 541 50 Skövde  
tel 0500-122 05

Vice ordförande: Märtha  
Andréasson, (SEF-årskongresser)  
PI 2265, 425 00 Hisings Kärra  
tel 031-57 11 33

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin  
(turnéer, bibliotek)  
Ringv. 11 B, 579 00 Högsby  
tel 0491-204 61

Styrelseledamot: Åke Rohdin (utred-  
ningar)  
Engelbrektsgr. 25 A, 702 13 Örebro,  
tel 019-18 53 60

Styrelseledamot: Haldo Vedin (utveck-  
ling)  
Jordbrogatan 57  
603 64 Norrköping  
tel 011-16 26 87

Suppleant: Ingemar Nordin (kans-  
liet).  
Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,  
tel 08-41 46 37

Suppleant: Bertil Andreasson  
(utbildning, nordiskt samarbete)  
Södra Rörum, 242 00 Hörby  
tel 0415-501 52

Informationskommittén: Bernt  
Lindquist  
Västermov. 19, 732 00 Arboga tel  
0589-155 31

**La redakcio de La Espero dan-  
kas ĉiujn kunhelpantojn kaj  
kontribuantojn kaj deziras**

**Bonan Kristnaskon  
kaj  
Aktivan Jubilean Jaron**

## La Espero 1987

Ek de ĉi tiu jaro la presapogo de  
ĉirkaŭ 10.000 kronoj pojare ĉe-  
sas laŭ decido de la Ŝtato. Ni  
serĉis kulturan apogon sed ne suk-  
cesis akiri, ĉar ni ne plenumas la  
postulojn.

Ni decidis en la estraro ke, ĝis  
nia ekonomia situacio ŝanĝos, ni  
eldonos ok numerojn, sed ĉu el  
tiuj estu duoblaj numeroj.

La unua numero de 1987 estos  
jubilea numero, kun ĉefe artikoloj  
en esperanto. Manuskriptoj, kiel  
kutime bone maŝinskribitaj, mi  
volas havi plej malfrue la 31-an de  
decembro.

## Nya årsavgifter för direkta medlemmar 1987

Direktansluten medlem	100 kr
Direktansluten familje- medlem (utan tidning)	50 kr
Direktansluten ungdoms- medlem	50 kr

Betala in avgiften genast så slipper  
ni belasta minnet med att komma  
ihåg det!

## Prezidanto:

**Paca jaro neniam ĉesos!**

1986 estas jaro de Paco, de UN proklamita. Ni dum la jaro ofte en diversaj kunteksto akcentis esperanton kiel rimedo por paco en tiu senco ke lingva interkompreniĝo inter homoj ne kreas malpacon. Do ĉar interkompreniĝo estas la ŝlosilo al paco lasu nin senĉese uzi tiun ŝlosilon por kunhelpi al paco en la mondo ne nur dum tiu paca jaro sed ankaŭ estonte!

## Kristnask-kaj Novjardeziroj

Feliĉan 1987  
al ĉiuj geamikoj  
Ingemar Nordin



Al ĉiuj niaj geamikoj  
ni deziras  
Feliĉan Novan Jaron  
Karin kaj Bernt Lindquist



Feliĉan kaj prosperan  
Jaron al ĉiuj geamikoj  
Lisbet kaj Bertil Andreasson



Feliĉan Novjaron  
deziras  
Willy kaj Vera Bürgemeister  
Åmål

**Venko por esperanto en la lernejoj?**

Aliloke en la gazeto ni raportas pri la Nordia Renkontiĝo en Bengtsfors. Mi tamen volas substreki la eksterordinare grandan kontentigon pri la rezulto de tiu renkontiĝo. La eduka konsilisto de La Supera Estraro de Instruado (SÖ) Bengt Thelin vere esprimis sian pozitivan opinion por esperanto kaj promesis "enkonduki" la lingvon kaj favore paroli pri ĝi en la diversaj instancoj de SÖ.

Meze de novembro Bertil Andreasson kaj mi kunsidos (jam okazis, kiam vi legas tion ĉi) kun respondeculoj de B- kaj C-lingvoj ĉe SÖ por diskuti ĉu ili povas rekomendi kaj proponi esperanton kiel aldonan temon en la lernejoj. Ni esperas pri sukceso.

**Konsilio de Eŭropo agnoskis  
Universalan Esperanto-Asocion**

Universala Esperanto-Asocio la-statempe ricevis Konsultan Statuson ĉe la Konsilio de Eŭropo, laŭ deklaro publikigita de la Ĝenerala Sekretario de la Konsilio, en Strasburgo, Francio. La Konsilio de Eŭropo estas kunlabora organizaĵo, en kiu membras la plimulto de la landoj de okcidenta kaj suda Eŭropo. Konsulta Statuso rajtigas UEA komenti pri demandoj sur la tagordo de la Kon-



silio kaj partopreni la debaton pri la politiko de la Konsilio. La deklaro de la Ĝenerala Sekretario ekvalidiĝis la 13-an de aŭgusto.

**Venko por esperanto entute 1987?**  
Diversloke en la gazeto vi povas legi pri klubaj kaj unuopulaj esperantistaj kampoj por esperanto.

Sur ĉiuj niveloj ni laboras kaj progresas, Eble ne estas revoluciaj antaŭenpaŝoj, sed iom post iom la homj komprenos ke esperanto estas solvo de lingvaj problemoj en la mondo!

Mi dankas vin ĉiujn pro via laboro dum la preskaŭ pasinta jaro kaj mi esperas ke la venonta jubilea jaro gvidos nin al limo de venko por esperanto.

Karin Lindquist

**Bonan Kristnaskon  
kaj  
Prosperan Jubilean  
Jaron  
deziras la estraro de SEF  
al ĉiuj legantoj**

# Kongress- resan till Warszawa 1987

Som vi nämnt i tidigare nummer av La Espero kommer Nord Syd Resor att arrangera en gruppresa till jubileumskongressen i Warszawa i samarbete med SEF. Det blir ett enkelt och bekvämt sätt att ta sig till och från kongressstaden och med logi och mat ordnat under kongressveckan.

Här nedan det preliminära programmet:

Avresa: fredag 24 juli 1987

Återkomst: måndag 3 augusti 1987

Påstigning: Stockholm - E 18 - Örebro - Jönköping - längs E 4-Helsingborg - Malmö - Ystad

Färja: Ystad - Swinouzije tur och retur nattfärja med hyttplatser

Visum: Kostnad för visum ingår

Buss: Modern helturistbuss med toalett

Reseledare/ehaufför: Sven Jansson och Lars Malmström

Hotell: Orbis Forum, centralt och nära "kongresejo" dubbelrum med dusch/WC, inkl frukost och middag

Åtta övernattningar (lördag-söndag)

Anmälningar: sker direkt till Nord Syd Resor - Enköpings Resebyrå, Box 336, 199 03 Enköping tel 0171-356 63

Pris: kronor 4.950

Många, många esperantister kommer att delta i jubileumskongressen. För att vara säker om plats i bussen anmäl er därför snart!



# Ingemund Bengtsson till SEF:s jubileumsko

Svenska Esperantoförbundet hälsar er alla hjärtligt välkomna till jubileumskongressen i Stockholm 10-13 april 1987. Kongressen kommer att få en alldeles särskild jubileumsprägel med talman Ingemund Bengtsson om invignings-

## Preliminärt program

Tidpunkt	Program	Lokal
<b>Fredag 10/4</b>		
12.00	Inflyttning	
13.00	Kongresejo öppnas	Grillska huset Stortorget 3-5
15.00	Presskonferens (särskilt inbjudna)	Riksdags- huset
16.00	Invigning av jubileumskongressen av riksdagens talman Ingemund Bengtsson	Riksdags- huset
	Festtal av UEA:s president Humphrey Tonkin	
19.00	Bekantskapsafton med korta programinslag	Grillska huset
<b>Lördag 11/4</b>		
09.00-11.30	SEF:s årsmöte	Riksdags- huset
11.30-12.30	Lunch	
13.00-16.30	Årsmöte övriga organisationer: ILEI, KELI, SEFA och SEJU Parallella program under tiden	Riksdags- huset
19.00	Bankett Tesupé för dem som inte deltar i banketten	Rest. Sjösidan Grillska huset
<b>Söndag 12/4</b>		
09.00-10.00	Gudstjänst	Lokal med- delas senare
10.00-11.30	Förlagsföreningens årsmöte	Riksdags- huset
11.30-13.00	Lunch	
13.00-15.00	Humphrey Tonkin: Esperanto i framtiden	Riksdags- huset
15.00-	Besök på medeltidsmuséet, rundvandring i gamla stan	
19.00	Underhållningskväll och avslutning	Lokal med- delas senare
<b>Måndag 13/4</b>		
09.00-12.00	Samling för information och flygbladsutdelning på Sergels torg, Gallerian, Fältöversten, Ringen	

# och Humphrey Tonkin ngress i Riksdagshuset

talare och med "världspresidenten" Humphrey Tonkin som festföreläsare.

Humphrey Tonkin medverkar dessutom i flera programpunkter och det kommer att ges tillfälle för oss alla att diskutera det framtida arbetet inom esperantorörelsen med honom.

## Information, anmälningar, måltider, hotell, priser m m Logi

Hotellbestämmelserna i Stockholm efterföljes rigorösare än i övriga Sverige. Vi kan få betala för ej utnyttjade rum, och detta vågar vi inte ekonomiskt riskera. Därför får ni själva boka rum denna gång. Om ni inte känner till Stockholms-hotellen ring någon i LKK, som kan rekommendera.

Enkla hotell kan man få för mellan 250 - 300 kronor för dubbelrum per natt och 200 kronor för enkelrum.

Det finns något som heter Stockholms-paketet och som omfattar tågresa, hotellrum och vissa erbjudanden till turister. Vi rekommenderar kongressdeltagare att undersöka det alternativet hos resebyrån på hemorten. Det kan vara en prisvärd lösning. Vi uppmanar er att beställa i god tid.

### Banketten 11/4 kronor 215:--

Restaurang på fartyg nära kongresejo. I priset ingår förrätt, varmrätt, dessert, kaffe och ett glas vin till maten.

### Tesupé 11/4 kronor 50:--

(alternativ för dem som inte deltar i banketten) I priset ingår te eller kaffe och landgång. Lokal är Grilliska huset.

### Anmälningsavgift

Kongressavgift över 25 år, t o m den 28 febr.	110:-- Kod A
Kongressavgift över 25 år, efter 1 mars	150:-- Kod B
Kongressavgift mellan 21-25 år t o m den 28 febr	80:-- Kod C
Kongressavgift mellan 21-25 år efter 1 mars	110:-- Kod D
Kongressavgift under 20 år t o m den 28 febr	50:-- Kod E
Kongressavgift under 20 år efter 1 mars	75:-- Kod F

### Måltider

Bekantskapsafton fredag 10/4	30:-- Kod G
Bankett lördag 11/4 (alternativ)	215:-- Kod H
Tesupé lördag 11/4 (alternativ)	50:-- Kod I
Medeltidsmuséet (inträde)	15:-- Kod J

### Sista anmälningsdag fredag den 27 mars 1987

Beställning och betalning till postgiro 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso c/o Arne Lundquist, Skohornsbacken 73, 126 39 Hägersten

### Loka Kongresa Komitato består av:

Anita Lindblom tel 07-751 73 79  
Birger Viggen tel 08-30 79 92  
Inger Hultqvist, 08-746 64 54  
Berit Postuma, 0753-339 28  
Arne Lundquist, tel 08-45 31 15

## UEA informas

# Venontaj paŝoj pri esperanto ĉe Unuigintaj Nacioj

Estonta agado ĉe Unuigintaj Nacioj estis ĉefa tagorda ero en la jara kunveno pri UN-agado, kiu okazis dum la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. La Asocio planas proponi al Unuigintaj Nacioj la jenajn paŝojn:

**Paŝo 1.** Oficialigo de Esperanto kiel traduka lingvo por certaj UN-dokumentoj, aldone al la jamaj laborlingvoj.

**Paŝo 2.** Ekskluziva utiligo de Esperanto kiel traduka lingvo por certaj kategorioj de dokumentoj.

**Paŝo 3.** Utiligo de Esperanto kiel interpreta lingvo en certaj kunsidoj.

**Paŝo 4.** Utiligo de Esperanto kiel sola interpreta lingvo.

Ĉiujn kvar paŝojn akompanus instruaj programoj por instigi anojn de la sekretariato kaj de la naciaj misioj kompetentiĝi pri skriba kaj parola Esperanto. Oni antaŭvidas, ke kiam Esperanto komencas esti uzata kiel la sola lingvo de interpretado kaj tradukado en certaj kunteksto, konsi-

## Kristana Literaturo

ĉiam havebla favorepreze ĉe ES-  
PERANTO-MISIO

Box 2007, 694 02 HALLSBERG  
2, Poŝta ĝirkonto 8 84 51-0 (Tel.  
0582-523 79 Sandgren)

# Inspira vento el SÖ en Nordia Renkontiĝo

— Esperanto havas taskon en la paca laboro! Viaj kluboj povas labori por helpi la lernejojn se ili serĉas "fratajn lernejojn" en aliaj landoj kaj kiam internaciaj organizoj agas por paco en la lernejoj.

derindaj financaj ŝparoj rezultos. Tiujn ŝparojn oni povus uzi por trejnado aŭ por aldoni pliajn laborlingvojn.

## Jubileo, instruado kaj praktika uzado estos ĉefaj prioritatoj de UEA

La Jubileo de Esperanto estos la ĉefa prioritato de la Universala Esperanto-Asocio en la venontaj monatoj, laŭ la novelektita prezidanto, d-ro Humphrey Tonkin, kiu alparolis la solenan Fermon de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino la 2-an de aŭgusto. En julio 1887 Ludoviko Zamenhof publikigis la unuan libron pri Esperanto. La festado de la Jubileo konsistos interalie el Universala Kongreso en Varsovio, kultura festivalo en Jugoslavio, kaj multaj regionaj kaj naciaj aranĝoj tra la tuta mondo. UEA lanĉis serion de eldonaĵoj por marki la Jubileon kaj ĝi antaŭvidas grandan informan kampanjon por atentigi la publikon pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Necesas doni pli grandan atenton al verkado kaj disvastigo de bonaj lerniloj kaj instruiloj de Esperanto, laŭ d-ro Tonkin. Oni ankaŭ devas pli multe atenti la praktikan utiligon de Esperanto en scienco kaj tekniko, precipe en la evoluantaj landoj.

106

Tiajn inspirajn vortojn diris **Bengt Thelin**, edukada konsilisto (undervingsråd vid Skolöverstyrelsen) al okdeko da esperantistoj, kiuj partoprenis en la Nordia Renkontiĝo en Bengtsfors en Dalsland komence de oktobro.



Edukada konsilisto de SÖ **Bengt Thelin**.

Fotis: Bernt Lindquist

Spite al la granda distanco venis al Bengtsfors 23 finnaj esperantistoj. El Norvegio partoprenis sep esperantistoj.

### Kial en Bengtsfors?

La kaŭzo ke la renkontiĝo okazis en Bengtsfors estis ke la lernejo tie donis al esperanto la rajton esti instruata kiel libere elektita temo. **Per Edler**, kiu estas instruisto tie, iniciatis tion kaj ankaŭ faris grandan laboron por la Nordia Renkontiĝo.

La juneco de la nova klubo en Bengtsfors estis sentebla tuj dum la inaŭguro de la renkontiĝo. **Horo Braŝanta**, kiu vere bele kantis, estis parte tre juneca, kaj juna estis ankaŭ la kluba prezidanto de Bengtsfors, **Ulrika Karlsson**, kiu bonvensalutis. **Komunumaj reprezentantoj.**

SEF-prezidanto **Karin Lindquist** en siaj bonvenaj vortoj substreki ke esperanto ne povas fa-



De maldekstre: La prezidanto de komunuma deputaro **Ulla Carlsson**, reprezentanto de Norvegio **Kjell Gustavsen**, la prezidanto de la klubo en Bengtsfors **Ulrika Karlsson**, la prezidanto de SEF **Karin Lindquist** kaj la reprezentanto de Finnlando **Sakari Kauppinen**. Fotis: Bernt Lindquist.

riĝi internacia lingvo se ĝi ne unue estas instruata en la lernejoj.

Prezidanto de komunuma deputaro **Ulla Carlsson** esprimis sian ĝojon vidi en Bengtsfors reprezentantojn el tuta Nordio.

Prezidanto de lerneja estraro **Gullvi Vilhelmsson** rakontis pri la decido doni al esperanto la rajton esti libervole instruata en Bengtsfors.

Por la finnaj gastoj parolis **Sakari Kauppinen** kaj por la norveĝaj gastoj **Kjell Gustavsen**. El Danlando venis saluta letero.

### Rapida kurso al junuloj

**Bertil Andreasson** gvidis publikan horon pri informado, kaj kelkaj partoprenantoj donis ekzemplon kaj pri sukcesa kaj pli fiaska provo informi.

— Ni devas eduki informantojn, ĉar ni vere bezonas tiajn, konkludis **Lennart Åberg**.

**Margareta Skarin** el Norrköping donis rapidan kurson al deko da junuloj. Kvankam iom pli ol unu horo estis tro mallonga tempo, oni jam rimarkis progreson ĉe la lernantoj. La prezidanto de la lerneja estraro **Gullvi Wilhelmsun** kun intereso sekvis la instruadon.

### SÖ-konsiloj al esperantistoj

**Bengt Thelin**, edukada kosilisto en SÖ, estis la ĉefpreleganto de la renkontiĝo. Li donis multajn bonajn konsilojn por la paclaboro:

— La historia edukado tro multe okupis pri militoj. Nun ni devas permesi la heroojn de la paco pli brili ol la herooj de la milito! Ofte mi ricevis maltrankviligajn raportojn ke niaj junuloj reagis kontraŭ tio ke la lernejoj tro malmulte pritraktas pacajn demandojn.

— Provu en la lernejoj ekhavi gefratajn lernejojn en aliaj landoj! Esperanto-klubo kun siaj mondaj kontaktoj povas helpi. Same ili havas taskon kiam internaciaj organizoj laboras en la lernejoj.

### Tamen "varmega terpomo"

Dum la diskuto poste kelkaj esperantistoj demandis al **Bengt Thelin** kia estas lia sinteno flanke al esperanto.

Li klare esprimis sian aprecon pri esperanto kaj promesis ke li en SÖ rakontu pri la renkontiĝo. Li ankaŭ dum studtagoj en lernejoj intencas menciigi esperanton. "Varmega terpomo" tamen estas se SÖ provas influi lokajn lernejojn...

La enhavoriĉa renkontiĝa programo havis ankaŭ prelegon de lektoro **Margrete Landmark** el Norvegio pri norvega esperantista edukplano por instruistoj kaj amikaj kunestadoj kun lumbilda raporto de **Anita Lindblom** pri la Pekina kongreso.


Renkontiĝejoj estis la kabana vi-



Lektoro **Margreta Landmark**.  
Fotis: **Ulf Ribers**

laĝo de **Furnäs**, ĉirkaŭita de beleĝa naturo, kiun ni bedaŭrinde havis tro malmulte da tempo por ekkoni...

**Börje Andersson**



La junuloj estis bone reprezentitaj.  
Fotis: **Bernt Lindquist**

Ĥoro **Braŝanta** lernis kelkajn esperantokantojn i a **La Himno**, kaj ili lerte kaj belege kantis por ni. Fotis: **Åke Rohdin**.



# DAGS FÖR UEA 1987

Nu är det dags igen att betala årsavgiften till UEA. Gör det i god tid, så hjälper du både dig själv och UEA.

Välj rätt avgift:

**MA-medlem**, dvs medlem med både årsbok och tidningen Esperanto, ett måste för alla aktiva esperantister

220:—

**MJ-medlem**, dvs medlem med enbart UEAs årsbok

88:—

**SZ-medlem**, dvs medlem i Societo Zamenhof. Denna avgift betalas utöver ovanstående avgifter. SZ-medlem blir stödjande medlem i UEA. Vi svenskar, som har möjlighet att betala till andra länder, och som har råd att betala, kan genom denna extra avgift göra en god insats för att hjälpa den internationella organisationen.


440:—

**INDIVIDUELL MEDLEM MA eller MJ** t o m 25 år blir automatiskt medlem i ungdomssektionen TEJO och får utan kostnad Kontakto. Sådana medlemmar ska anteckna MA-K eller MJ-K på inbetalningstalongen. Andra medlemmar kan prenumerera på Kontakto för 60 kronor per år.

Inbetalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto.

Förfrågningar kan göras hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel 0415-501 52.

## Dekjariĝa festeno



Christer Kiselman

La universitata kaj altlerneja aŭtoritato tutsveduja (svedlingve UHÄ, Universitets- och högskoleämbetet) festenis sian dekjarigon la dekan de oktobro 1986 per multaj okazaĵoj, kunigitaj sub la ĝenerala temo "Komuniko", en Folkets Hus (La Popola Domo) en Stokholmo. Partoprenis precipe dungitoj kaj studentoj de la svedaj universitato kaj altlernejoj, kaj la programo estis multenhava, ĉar temis pri pluraj aspektoj de komunikado: lingvaj, psikologiaj, sociaj, ideologiaj, teknikaj; ankaŭ pri dancado kaj arkitekturo. Kelkaj programeroj estis komunaj al ĉiuj (kaj dum la mateno partoprenis pli ol mil personoj), ekz. la paroladoj de la eduka ministro Lennart Bodström kaj la ŝtata sekretario Sverker Gustavsson, kaj la prelego de la astronomo Bengt Gustafsson pri spaca aventuro kiu lokigis la tutan homaran spertaron en la kosmo. Aliaj, male, estis paralelaj kiel ekz. la prelegoj de Per Linell ("Kio estas komuniko?"), Jens Allwood ("Kio estas lingvo?") kaj Aant Elzinga ("Kio estas scio?"). Preskaŭ ĉiuj temoj estis de unuaranga intereso por esperantisto, sed kelkaj eĉ pli ol aliaj, ekz. "Lingva edukado kaj la monda mapo" (Ĉu la lingva edukado de la svedaj lernejoj kongruas kun la lingva realaĵo de la planedo?), aŭ "Kiel oni perceptas la lingvaĵon de virinoj (ĉu ne ankaŭ de viroj?), kamparanoj kaj

## Anmäl Dig till jubileumskongressen i Warszawa 25 juli — 1 augusti 1987

Kongressen kommer att få karaktären av festival. Den blir ett historiskt minne för alla esperantister.

Om du anmäler Dig före årets slut blir kongressavgiften lägre som vanligt.

	Kongressavgifter (i svenska kronor)		
	Till 31/12 1986	Till 14/5 1987	Från 15/5 1987
1. Direkt medlem i UEA .....	490:—	610:—	740:—
2. Icke direkt medlem i UEA .....	610:—	740:—	860:—
3. Kunulo/junulo/handikapulo — direkt medlem i UEA .....	250:—	370:—	490:—
4. Kunulo/junulo/handikapulo — Icke direkt medlem i UEA .....	370:—	490:—	610:—

Beställ anmälningsblankett från Lisbeth Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby, tel. 0415-501 52 (Lisbeth är ny UEA-"peranto" från 1 oktober i år). Blanketten skall sedan tillbaka till samma adress.

All betalning sker till postgirokonto 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Anteckna på talongen vad betalningen avser.



# TRA LA LANDO

## Anglino faras turneon uzante Esperanton

Je la 1-a de septembro, mi alvenis en Svedio por doni, mi esperas, interesan paroladon al esperantaj grupoj pri la eta insulo Sark, kaj pere de ĝi propagandi esperanton inter aliaj grupoj, ekzemple ĉe politikaj kaj religiaj kunvenoj, kaj en lernejoj.

Mi pasigis la tempon en suda Svedio. La turneon, kiu komenciĝis en Hörby, lerte aranĝis Kerstin Rohdin. Mi mem estas pensionulo, do nun por la unua fojo havas tempon fari, kion mi volas.

La turneo sin dividis en tri partojn: unue mi estis en kamparaj lokoj kaj malgrandaj urboj, kie mi sukcesis plejparte pro la rapida tradukado de mia prelego, kaj eĉ

eksterlandanoj?". Pri la lasta temo parolis Jan Einarsson.

Unu programero temis esplice pri esperanto: Christer Kiselman parolis pri esperanto kiel modelo de translima komunikado. Partoprenis proksimume 10 personoj (estis dum la posttagmezo kun multegaj paralelaj seminarioj), el kiuj nur unu estis studinta esperanton. Tre scivolema etoso regis. La punktoj de la prezento estis: Kreiveco kaj ties limoj; Komunikado kaj ties limoj; Bialystok 1859, Ulm 1879, Vitebsk 1887; Kio estas esperanto?; Komunikado kaj potenco; La Lingvo sarkita de perturboj; La nacio kiel unu el multaj niveloj en hierarkio; Unu el la grandaj lingvoj; Internacia kulturo; Esperanto kiel modelo de translima komunikado.

Post la taga programo, preskaŭ 350 personoj vespermanĝis. Ni kune kantis en esperanto kanzonon porokaze verkitan, kies teksto kun sveda traduko estis distribuita ĉe ĉiu tablo.

Christer Kiselman

pli, pro la esperanta interbabilado, kiam oni poste faris demandojn, konvinki politikajn grupojn kaj precipe geinstruistojn, ke svedo kaj anglo povis vere flue paroli esperanton – pli flue ol la anglan lingvon. La ĵurnalistoj kelkloke raportis favore pri la kunvenoj.

La dua parto de la turneo baziĝis en Karlskoga, kie mi vivis en studenta ĉambro ĉe la Altlernejo por plenkreskuloj. Jam oni instruas esperanton tie, kaj mi konvinkiĝas, ke miaj prelegoj en la lernejo, kaj nia interbabilado ĉe la manĝoj – kiam instruistoj kaj studentoj sidis ĉe nia tablo – helpas la kreskadon de la laboro en tiu lernejo.

Fine, dum la lasta triono, mi vizitis urbojn, restante unu nokton ĉe ĉiu, denove vizitante kaj esperantistajn kaj ne-esperantistajn kunvenojn. Mi foriris de Göteborg la 20-an de septembro.

Por mi estis neforgesebla sperto: Neniam antaŭe mi faris tian turneon. Mi reiras al Anglio kun belaj memorajoj pri la esperantistoj, kiujn mi renkontis, kaj pri la arbaroj kaj precipe pri la belaj lagoj de via lando.

Myrtle Green  
Ipswich, Anglio

## Hungaro turneis en Svedio

Turneis en Svedio dum oktobro kaj novembro D-ro Ferenc Jaki de Budapeŝto. La turneo estis aranĝita de Kerstin Rohdin. D-ro Jaki vizitis pli ol dekdu urbojn por prelegi pri Hungario, la hungara literaturo kaj la evoluo de la Kalendaro. Aparta trajto de la turneo estis, ke D-ro Jaki ofte prelegis al ne-esperantistaj grupoj, pere de tradukistoj. Tiel, pli vasta publiko ricevis ŝancon aŭskulti la lingvon kaj konstati, ke Espe-

ranto fakte funkcias kiel vivanta lingvo. La informo-dona rezulto de tio estis granda, ĉar estas ĝuste tiuj membroj de la publiko kiuj ankoraŭ ne informiĝis pri esperanto kiujn oni volis kontakti. (Unu el la celoj de la Sveda Esperanto-Federacio estas, ke dum la Jubilea Jaro ĉiu svedo informiĝos pri Esperanto). La aŭskultantaroj de D-ro Jaki estis variaj. Li prelegis ne nur en esperanto-kluboj sed ankaŭ al lernantoj (kaj iliaj instruistoj) en lernejoj; al membroj de diversaj societoj kiel Rotary; kaj en bibliotekoj. Aparte valora okazo estis prelego al grupo de bibliotekistoj en Växjö ĉar tiu grupo fake interesiĝas pri lingvoj kaj havas rektan kontakton al la publiko, kaj pro tio bone lokiĝas por respondi al informpetoj pri Esperanto. Artikoloj pri D-ro Jaki kaj pri Esperanto aperis en gazetoj en preskaŭ ĉiu loko kaj rezulte de la turneo kelkcentoj da homoj nun scias, ke Esperanto estas lingvo aktuale uzata internacie por kaj fakaj kaj ĉiutagaj celoj.

Harold Brown

## Suda regiono

### Okazintaĵoj dum la aŭtuno.

La 7-an de septembro danoj kaj svedoj renkontiĝis en Höje-Tåstrup por partopreni la 42-an Dan-svedan Esperantotagon. Ĉirkaŭ 70 personoj venis por esti akceptataj de la urbestro, fari viziton en la mondkonata semfirmao Ohlsens Enke kaj interparoli kun gemikoj.

Suda Distrikto de SEF aranĝis semajnfinan kurson 11-12 okt. sub lerta gvidado de Ferenc Jaki, Hungario. 20 personoj partoprenis. Sabatvespere sinjoro Jaki parolis pri sia hejmlando, pri la historio, lingvo kaj kulturo. Dimanĉe ni okupiĝis pri literaturo

generale kaj esperanta literaturo speciale. Inter alie ni estis instruataj ke "la literaturo estas figurado de la vivo per la ilo de la lingvo". Du gigantoj el la esperanta literaturo, Julio Baghy kaj Kaloman Kalocsay, estis vivigataj por ni en tre lerta maniero. Vere sukceza kurso, kiu turnis sin al personoj, kiuj dum iom da tempo studis la lingvon. Mi nur bedaŭras ke ne pli da homoj kaptis la okazon veni al la kurso.

**La Esperantoklubo en Malmö** kiel kutime havis ekspozicion en la Skania foiro kaj ĝi poste estis translokita al la biblioteko de Lindängen, kie ĝi restis dum septembro.

En Malmö nova postagmeza kurso komenciĝis. Evidente multaj personoj atendis tiun, ĉar 15 partoprenantoj aktivis tie. La kurson gvidas Jan Strönne. Myrtle Green en septembro vizitis Skanion. Ŝi parolis por esperantistoj en la esperantoklubo en Lund kaj por ne-esperantistoj en Hörby ĉe samarangoj inter Mezskania Esperantoklubo kaj la loka grupo de Folkpartiet. Ŝi ankaŭ vizitis Älvdalsskolan en Hörby, kie grupo dum la aŭtuna studsezono havas esperanton kiel libera aktiveco.

En Mezskanio la esperantoklubo ankaŭ aranĝis ekspozicion en Hörby en septembro, kaj en Höör kaj en la filioj de la biblioteko de Kristianstad en novembro. Ankaŭ en Lund la klubo aranĝis ekspozicion en la urba biblioteko dum septembro.

Lisbet Andreasson

## TEDU-regiono

TEDU-regionen planeraras ordna en veĉkoslutskurs 31 januaro-1 februaro 1987. Kursen komer att äga rum i Karlskoga, i samarbete med Karlskoga Folkhögskola. Dels blir det esperantokurser på olika nivåer, dels ska vi ha en diskussionsgrupp, som under ledning

av Haldo Vedin, ska diskutera bl.a. vad vi kan göra för att föra esperantorörelsen framåt, vilka mål som är rimliga att ställa osv.

Övernattning kommer att ske till helt rimliga kostnader, men för den som bara vill deltaga i kurserna en dag, så är detta också möjligt.

Närmare upplysningar lämnas av Lars Forsman vid Karlskoga Folkhögskola tel 0586-503 60 eller undertecknad tel 021-33 11 71.

Gunilla Sundholm

## Nova klubo en Hällefors

Nova klubo estis fondita en Hällefors. Estas anoj en kurso, gvidita de Harald Andersson, kiuj faris tiun saĝan decidon fondi klubon.

La estraro konsistas el:

**Britt-Marie Dahlin, prezidanto**  
**Harald Andersson, vicprezidanto**  
**Margaretha Olsson, sekretario**  
**Lennart Svensson, vicsekretario**  
**Ann-Britt Hermansson, kasisto**

Ili jam partoprenis en Pacarangoj kaj nun ili planas por ekspozicio en biblioteko kaj informado dum "Lion-tago" (do en la kunlaboro kun la asocio Lions).

Ni ĉiuj deziras al ili bonan sukceson kaj prosperon.

## La esperantotago en Västerås

Västerås Esperantoklubb decidis jam en januaro '86 aranĝi tiun tagon, mendi lokon en la biblioteko, konstrui ian ekspozicion, kaj inviti la klubanojn de la esperantista klubo de Lahti, Finnlando (Lahti estas la ĝemelurbo de Västerås).

La rezulto estas bela mondmapo, titolita "Vojaĝo per Esperanto" plus aneksa materialo, kiu pritraktas la eblecojn de Pasporta Servo. (Klubo nun povas prunti ĝin. Restas la problemo de la transporto). La ekspozicio estis



## Internationell kultur i praktiken

27 decembro - 3 januaro komer det traditionella Internacia Seminario att äga rum i Köln i Västtyskland. Det har temat "Internationell kultur i praktiken". "Festival" kanske vore ett bättre namn än "seminarium" för det komer att bli möjlighet att deltaga i folkdans, musik, teater och mycket annat. Anmälningar till: Thomas Pusch, Am Schwertberge 23, D2845 Damme, Västtyskland.

montrita unu semajnon antaŭ la Espranto Tago.

### Kelkaj konsekvencoj:

- En la ĉefa gubernia taggazeto VLT aperis dum la semajno 3 fojojn anonceto por atentigi la Tagon kaj la ekspozicion. Krome, VLT publikigis artikoleon pri la vizito de la Lahtianoj kaj pri Pasporta Servo.
- Ĵurnalistino de Västmanlands Nyheter intervjuis Gunilla kaj ŝi men tiel entuziasmiĝis, ke ŝi nun studas la leterkurson de SEF.
- Granda surprizo dum la Tago estis, ke la Finna sekcio de Radio Västmanland intervjuis niajn gastojn. La elsendo okazis jam la saman tagon je la 16.30. Estis 10 minuta programo kun muziko kaj esperantokantado. La intervjuo temis

## Korespondado

Andrzej Sochacki  
ul. Langiewicza 15/25  
28-200 Staszów  
Pollando

31-jara tekniko. Gvidanto de Esperanto-klubo. Interesiĝas pri poŝtmarkoj, bildkartoj, fotografaĵo, turismo, problemoj de paco.

Mario Jesús Ortegón Espinel  
Calle 14 No 1-23  
Bogotá  
Colombio

43-jara instruisto de fiziko, matematiko kaj Esperanto. Kolektas poŝtkartojn pri naturaj belajoj.

S-ro Lee Namdag Ĵanĉivin  
ul. Fruškogorska Br 11  
N. Singeliĉ  
91000 Skopje  
Jugoslavio  
39-jara arĥitekto.

Glauco Rordrigues Corrêa  
Rua Nagib Jabor, 575/211 – Alfenas  
BR 88090 Florianópolis, SC  
Brazilo  
57-jara emerita profesoro de literaturo.

S-ro Hamid Faraĝi  
26-M. Ettehad – 10 Metrye  
Zeynabiyeh  
KH. Irakidiyeh  
16446 Teheran  
Irano

22-jara fraŭlo. Ŝatas muzikon, arton, literaturon, naturon.

Stanislav Pech  
Zdemyslice 108  
336 01 Blovice  
Ĉeĥoslovakio  
29-jara laboristo. Nova esperantisto. Kolektas bildkartojn.

Vašek Podvala  
Bartošova čtvrt 3997  
760 01 Gottwaldov  
Ĉeĥoslovakio

21-jara laboristo. Ŝatas grafikojn, pentraĵon, muzikon, vojaĝadon. Serĉas bonegajn korespondamilojn.

A.R. Dowlatshahi  
P B 14875/142  
Teheran  
Irano

21-jara studento. Ŝatas arton, mitologion, filozofion kaj lingvistikon. Kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Du junaj poloj en aĝoj 21 kaj 25 j. volas kontakti kun junaj svedaj esperantistinoj:

Piotr Samwila  
85-804 Bydgoszcz  
Ul. Wakowiego 4150  
Pollando

Przemysław Jankiewicz  
63-400 Ostrów Wlko  
SKr. Poczl. 60  
Pollando

Florencio Cruzaley  
Postfack 11 04 49  
1000 Berlin 11

Juna viro de Meksiko deziras korespondi kun sveda fraŭlino. Interesiĝas pri sveda kulturo, vojaĝoj, lingvoj.

Du kolektantoj serĉas bildkartkolektantojn en Skandinavio por serioza interŝanĝo. Unu el ili komencas lerni svedan lingvon.

Skribu al:  
Vladimir V. Charin  
Pk 941 – 2  
SU - 252 141, Kiev – 141  
USSR

pri "la situacio de Esperanto en Finnlando".

La vespera programo en la "Flava Domo" estis eksterordinare agraba. Tio dank' al la ĉeesto de niaj Finnaj gastoj, la prezidantino de SEF kaj ŝia edzo. Neniam antaŭe ni povis aranĝi tian mu-

zikvesperon kun diversaj muzikistiloj.

Post 29 horoj inter ni, niaj amikoj denove revojaĝis Suomion. Nur per la ĉeesto, ili bone helpis min!

## Torsten Ehrenmark en esperanto!

*El la sveda tradukis Karin Hedman, lernanto en ABF-kurso en Stockholm*

Mi aĉetis lokan gazeton en Lidköping antaŭ nelonge kaj legis pri ses kilogramojn peza ezoko kiun iu kaptis per la hoko. Kiam ĝi senintestiĝis, ĝi havis en la stomako du kankrojn kiujn ĝi glutegis kun karno kaj ŝelo. Sed tio ne estas tiel stranga, ĉar ĉiuj supozeble ŝatas kankrojn, inkluzive ezokoj, kvankam ili ne ekhavas ilin bolitajn kun aneto. Sed tio je kio mi fiksas la atenton estis la fino de la noto, kiu rakontis ke la ezoko poste estiĝis delikata tagmanĝo al la familio, "Escepte la kapon, kiu kun la tempo fariĝos lampo!" estis skribita, laŭvorte citita. Kaj tiam mi fariĝis tre meditema kaj provis imagi kiel aspektos tiu hejmo kiam ili eklumigas la vesperlampon kaj ĝi disverŝas sian mildan lumon el kranio de ezoko.

Ekzistas nekontraŭstarebla instinkto en la homoj fari lampojn el la plej barokaj objektoj sed ezokokranio kiel lampo indikas preskaŭ trolaboritan senton pri hejminstalado.

Tie ĉi vi cetere ricevos hejminstaladosugeston de eleganta mi, ĉar mi estas hodiaŭ plej malvarhumora. Ne forjetu kapon kaj dorsoŝildon kiam vi manĝas kankrojn. Glufiksu denove la ŝildon kun la kapo kaj enmuntu lampeton. Serie kuplu okdekon da tiel adaptitaj kankroŝeloj kaj loku ilin en la kristnaskarbo anstataŭ la enuigaj kandeloj, kaj vi ricevos sorĉan ruĝetan lumefekton kiu transformas la malgajan antaŭvesperon de Kristnasko al romantika aŭgustonokto. Mi havas tiel idiotajn ideojn ke mi ne komprenas ke mi ne dungigas en hejminstaladogazeto.

Wim

## Al festeno komunika

Kanzono dediĉita al la dekjariĝo de UHĀ (la universitata kaj alterneja aŭtoritato tutsveduja) la 10an de oktobro 1986. Kanteblas laŭ la konata sveda kanzono "Fjärilin vingad syns på Haga" (Flirtas Haga papilio") de Carl Michael Bellman (1740–1795).


Komuniki devas ĉiuj;  
eksterduba ŝajnas la bezon'.  
La problemo nur: al kiuj  
kaj pri kio estu la admon'?  
Civilizoj tra jarmiloj:  
perlitera la mesaĝ'.  
Por praĉeloj la sendiloj  
do-no-a-e verkis dum egaĝ'.

Komunikon tujtraspacan  
malpermesas Einstein-teori',  
sed Ursula nun senlancan  
ansibilon trovis (bon' por ŝi).  
Komuniko transkultura  
malfacilas; ĉu nur antaŭjuĝ'?  
Esperanto, ilo nura,  
helpas al la pensa fuĝ'.

Temo vasta, eĉ nebula,  
komuniko taŭgas por festen',  
kaj pritraktas ĝin gravula  
parolado de nia Andrén.  
Nur dekjara la ofico,  
sed matura la kancel-  
iereco; sen malico  
ni prikantu ĝin ĝis ĉiel'!

### Notoj al la kanzono

Ansibilo: de la verbo **ansibi**, ambaŭdirekte kaj senprokraste komuniki spite al la relativeca teorio. Ursula Le Guin laborigas en sia romano "The Dispossessed" la fizikiston Shevek, kiu ellaboras la bazon de spac-tempa teorio. Poste tiu teorio ebligas la konstruon de la ansibilo, sen kiu nenia monda lingvo povus ekzisti. Andrén: Carl-Gustaf Andrén estas la sveda universitata kanceliero. Lia ofico estas pli ol kvincentjara, sed la aŭtoritato kiun li estras estis rekrea en 1976.



POR PACO EN LIBERECO

POR LIBERECO EN PACO

## Jubilea Esperanto-Konferenco Graz 1987

La Konferenco okazos de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987 sub la ĉefa temo "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo". La Konferencejo estas la Universitato de Graz. Plej kompetentaj lekciistoj pritraktos diversajn aspektojn de la ĉeftemoj, inter ili D-ro André **Albault**, S-ino Marjorie **Boulton**,

## DANKON



Koran dankon pro viaj bonvenaj donacoj

### Donacoj

Arne Lindstrand, Bjärnum 25:—  
Giro 4411462-7 40:—  
Hilding Andersson, Arvika 25:—  
Märtha Andreasson, Hisings  
Kärra 100:—

### Klubo Cent Jaroj

Ragnar Hjorth, Stockholm 100:—

Prof. D-ro Ivo **Lapenna**. Prof. D-ro Paul **Neergaard** k.a.

Unu el la ĉefaj programeroj estos la inaŭguro de la skulptaĵo "La Espero" de Jesper Neergaard kiel monumento al la 100-jara Jubileo de Esperanto. Al la kostoj kontribuis la urbo Graz kaj multaj donacintoj el la tuta Esperanto-Movado, kiuj ricevos belan memordokumenton.

Alia progamero estos la malfermo de ampleksa ekspozicio de Esperanto literaturo, kiun organizos la Stiria Landa Biblioteko en salonego en la urbocentro de Graz.

## Boknyheter

Borg	Plupo kaj la gruoj	30 kr
Borg	Plupo kaj la lupoj	30 kr
Borg	Plupo kaj la maro	30 kr
	Antologio de maltaj poetoj	60 kr
Valano	Ĉu rakonti nobele?	99 kr

Beställes via postgiro 20 12 – 3, SEF  
eller 578 – 5, Esperantoförlaget